



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 3

Marto 2024 Kol. 465/40

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

**Enhavo:** UEA pri la Gepatra lingvo, Invito al Aruŝa, Venu al Itala Kongreso, Infano tenanta flolvazon, Viro, kiu plantas arbojn, El Novaĵoj Tamtamas de P. Chrdle

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

## UEA mesaĝas pri la Gepatra Lingvo

Dum la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, ni antaŭenigas la gravecon de lingva diverseco kaj multlingva edukado. Lingvaj rajtoj estas fundamento por justaj kaj daŭripovaj socioj, ĉar lingvoj estas ĉe la koro de niaj ĉiutaga vivo, identeco, kultura heredaĵo kaj komunuma unuiĝo. Lingvoj estas bazo por aliri ĉiujn aliajn homajn rajtojn.

Protekto kaj antaŭenigo de lingvoj gravegas, ĉar pere de lingvoj oni transdonas mondrigardojn kaj konservas lokajn kaj tradiciajn sciojn kaj kulturojn. Bedaŭrinde, laŭ Unesko, 40 procentoj de la monda loĝantaro ne havas aliron al edukado en lingvo, kiun ili parolas aŭ komprenas. Samtempe, pli kaj pli da lingvoj malaperas.

En niaj pli kaj pli plurecaj socioj, kaj antaŭ la ideo de tutmonda socio kiu inkluzivas la tutan homaron, la demando pri lingvoj fariĝas nepre prioritato. Fakte, lingvoj estas la absoluta

fundamento de kompreniĝo kaj kunlaboro. Tiel, lingvaj rajtoj rilatas rekte al demokratio kaj vera komuna decidado pri komunaj problemoj.

Ni antaŭenigu la valorojn de multlingva mondo proponitajn de Unesko: instruado en gepatraj lingvoj, multlingva edukado en ĉiuj niveloj, kaj interkultura edukado. Tiel, ni esperas, ke paco, evoluigo kaj homaj rajtoj fariĝos realaĵo por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Per lingvoj ni kundividus nian homecon. Ni uzu kaj antaŭenigu ĉiujn lingvojn, inkluzive la internacian lingvon Esperanto, por realigi tiujn principojn kaj valorojn. Por festi la solidarecon inter homoj de malsamaj devenoj, ni ankaŭ invitas homojn de bona volo al la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio. En la PDF jen, la rilata afiŝo en Esperanto kaj la sŭahila.

Fonto: Gazetara Komunikado de UEA. Tradukoj de la komunikado:  
<https://esperantoporun.org/eo/tago-de-la-gepatra-lingvo-2024>

## **Invito al Aruŝa, al Afriko**

La tutmonda, viva aspekto de la plej prestiĝa Esperanto-renkontiĝo en Esperantujo esprimiĝis ankoraŭ ĉi-jare en Torino, kadre de la 108-a Universala Kongreso, per partopreno de homoj el ĉiuj kontinentoj. Afriko aparte estis reprezentita per aktivuloj el Angolo, Benino, Burundo, Madagaskaro, Niĝerio,

Tanzanio kaj Togolando. Temis pri senprecedenca nombro de afrikaj partoprenantoj. Ĝenerale estis bonegaj impresoj pri la renkontiĝo kaj pri la gastiganta urbo Torino. Gratulojn al ĉiuj etnoj, kiuj kunlaboris pri la sukcesa aranĝo kaj dankon al ĉiuj partoprenintoj. Multnombre kongresanoj venis ĉeesti la oficialan prezenton de John Magessa pri la venontjara Universala Kongreso, la unua en Afriko! Leviĝis oportune demandoj kaj venis kontentigaj respondoj jen de la LKK, jen de la Kongresa fako de UEA, jen de homoj alikontinentaj, kiuj iam vizitis Afrikon. Espereble, ĉio estis nun sufiĉe klara (kompreneble oni povas ankoraŭ, skribi, demandi, se oni bezonas pli da klarigoj)! Jam ne plu estas kialo por ne vojaĝi al Afriko. En Aruŝo ekzistas ĉiuj servoj, kiujn oni trovas en ĉiuj grandaj urboj: diversaj hoteloj, busoj, ATM-aŭtomatoj, polico, bankoj, apotekoj, malsanulejoj ktp. Kaj plia bona novaĵo: por alikontinentanoj ne estas devigo havi vakcinon por eniri Tanzanion! Bonvolu jam nun komenci plani vian vojaĝon al la 109-a UK. Aruŝo ĝojas bonvenigi vin ĉiujn por spertigi vin pri la bunteco kaj riĉeco de Tanzanio, la hejmo de gravaj mirindaĵoj. Tie la LKK preparas por vi agrable neforgeseblan kongreson en 2024. La kongresa temo estas: ‘Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo’. Bonvolu konsideri...kaj nun aliĝi al la 109-a Universala Kongreso por ĝui la plej favorprezan aliĝperiodon! Transprenita el la EKO 2023 ĉe <https://uk.esperanto.net/2024/>

## **Venu al la 90-a Itala Kongreso en Montecatini Terme**

Ĉu vi sopiras la kombinon de esperantismo kaj ripozado? Partoprenu la spektaklan Italan Kongreson de Esperanto en Montecatini Terme, de la 24-a ĝis la 31-a de aŭgusto 2024.

Montecatini Terme, kiel Monda Heredaĵo de Unesko, ofertas pli ol nur kongresan sperton. En tiu ĉi urbo, kiu jam en 1770 kanalis siajn varmajn akvojn por ilin uzi kuracocelo, kaj fine de la 19-a jarcento lanĉis la modernan koncepton de varmakva kuracado, tiam renovigante la urbon por igi ĝin unu el la plej karakterizaj ekzemploj de la secesia stilo *Liberty*, kaj kie unu el la plej antikvaj surrelaj kablotraĵoj, funkcia ekde 1898, portas vin de la moderna urbo al la mezepoka fortres-vilaĝo, vi havos la unikan ŝancon ĝui la internacian Esperanto-etoson, kaj ankaŭ ripozi kaj ekskursi tra Toskanio, la regiono de Pisa (45 km), Florenco (48 km), Pistoia (13 km), Lucca (25 km), Massa (70 km), kiujn vi povos viziti per la kongresaj ekskursoj tra monumentoj, muzeoj, kasteloj, grotoj kaj Esperanto-bibliotekoj.

Montecatini Terme facile atingeblas jam de 1853 per la Leopolda fervojo kiu kunligas la havenurbon Livorno kun Pisa, Lucca, Pistoia, Florenco. Nuntempe uzeblas la flughaveno de Pisa aŭ Florenco. La transnacia seria retejo 'La Grandaj Termobanaj-urboj de Eŭropo' inkluzivas grupon de 11 urboj de 7 eŭropaj landoj (Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Italio kaj Britio), konsiderataj de Unesko kiel la plej reprezentaj lokoj de eŭropa termo-bana agado. Aliĝo:

[kongreso.esperanto.it/90](http://kongreso.esperanto.it/90)

El EKO-numero 2024:08, februaro 15

## **Infano tenanta en la manoj florvazon senfloran**

[memore al nia bedaŭrata leganto s-ro Ji Yin'geng en Ŝanhajo, Ĉinio] ĉina legendo - rerakontis Ji Yin'geng.

Longe longe antaŭe vivis saĝa reĝo, sub kies gvido la lando estis prospera kaj la popolo vivis en paco. En sia maljuneco al li mankis nenio, sed bedaŭrinde li havis nek filon nek filinon. Iutage li pensis: “Mi selektu plej honestan infanon en la tuta lando kiel mian infanon.” Li preparigis multe da florsemoj kaj ordonis al sia subulo, por ke li disdonu la florsemojn al ĉiuj infanoj en la tuta lando, al ĉiu po unu, kaj diru al ili, ke tiu, kiu elkultivos plej belan floron el la ricevita florsemo, fariĝos la filo aŭ filino de la reĝo. “Ĉiuj infanoj enterigis la ricevitan florsemon en sian florvazon kaj akvumis ĉiutage. Ankaŭ YAO Qiang atente prizorgis sian florsemon. Bedaŭrinde, pasis dek tagoj, pasis dek kvin tagoj, pasis monato, sed la florsemo en la tero neniam ĝermis. “Strange!” li pensis kaj ne sciis kial. Finfine li iris demandi sian patrino: “Panjo, kial mia florsemo ne ĝermis?” La patrino ankaŭ ĉagreniĝis pri la afero kaj elbuŝigis: “Ŝanĝu la florvazon kaj la teron en ĝi kaj provu enterigi refoje.” YAO Qiang ŝanĝis la florvazon kaj la teron en la florvazo kaj enterigis la florsemon denove kiel lia patrino diris, sed la florsemo ankoraŭ kiel antaŭe ĉiam kuŝis en la florvazo kaj neniam ĝermis.

Venis la tago, kiam la reĝo rigardu la florojn. Multe kaj multe da infanoj de la tuta lando alvenis al la ĉefurbo kaj viciĝis ĉe strato apud la reĝa palaco kaj atendis, por ke la reĝo rigardu la freŝajn florojn. Ili ĉiuj portas belegajn vestojn kaj en la manoj tenas florvazon, en kiu freŝa floro pompe disvolviĝis. Ĉiuj volas fariĝi la filo aŭ filino de la reĝo kaj heredi la tronon. Sed kial? Kial la reĝo, rigardante la florojn, preterpasas la infanojn unu post la alia kaj survizaĝe aspektas malĝoja?

Abrupte la reĝo vidis, ke YAO Qiang je la vosto de la vico tenas en la manoj florvazon sen-floran. La reĝo ordonis sian

sekvanton, por ke li venigu YAO Qiang. Kiam YAO Qiang alvenis, la reĝo demandis: “Kial vi tenas en la manoj la florvazon sen floro?” YAO Qiang rakontis al la reĝo, kiel li enterigis la florsemon, sed bedaŭrinde, ne scias, kial la florsemo neniam ĝermis, eble oni punos lin, ke li ŝtele ŝiris pomon sur la pomujo de najbaro iufoje. Aŭdinte, la reĝo, preninte al li la manon, ĝoje diris: “Vi estas mia honesta filo.” Sur la strato tuj ekbolis tumulto. “Kial la reĝo rigardas la infanon tenantan en la manoj florvazon sen floro kiel sian filon?” oni flustradis.

La reĝo eksplikis al la ĉeestantoj: “Miaj patrolandanoj, la florsemoj, kiujn mi disdonis al la infanoj, estis sufiĉe kuiritaj.” Ĉiuj do jese balancis la kapon. Tiuj infanoj, kiuj tenis en la manoj florvazon kun freŝa floro, ruĝiĝis de honto, ĉar ĉiuj iliaj freŝfloroj estis kultivitaj de aliaj florsemoj. Ekvidinte tion la reĝo sincere diris: “Infanoj, erari ne estas grave, grave estas memscie korekti la eraron. Mi esperus, ke vi ĉiuj fariĝos honestaj infanoj.”

Ree ĉiuj ĉeestantoj jese balancis la kapon.

El la Novaĵoj Tamtamas n-ro 387/6/2023

## **Viro, kiu plantas arbojn**

Tio estas eble, sed nur danke al helpo de virinoj.

Adam Diémé (en centro de foto), estis dum kelkaj jaroj laboranta en Francio kaj kiam li revenis en naskiĝregionon Casamance Senegal, li estis konsterniĝita: Preskaŭ ĉiuj arboj intertempe malaperis Centoj da gigantaj baobaboj finis la vivon en fajrejoj aŭ kiel materialo por produkti meblarojn, kanuojn ktp.

"Ĉiuj homoj faligis, sed neniu plantis novajn arbojn", konstatis Diémé. "Pro tio mi decidis eklabori pri savo de nia



naturu – mia celo estas planti en Senegal dum kvin jaroj kvin milionojn da arboj, ĉefe baobabojn." En realigo de sia sonĝo li plasis tutajn siajn ŝparaĵojn – kvin mil dolarojn – kaj per helpo de sociaj retoj li organizis projekton Ununukolaal. Per ĝia helpo li akiras monon el eksterlando – ekzemple el Hispanio – aŭ ankaŭ ekzemple per vendado de trikvestoj kun bildeto de baobabo. Por unu vendita trikvesto estas dek kvin plantotaĵoj de baobabo.

"Mi malkovris, ke por plenumi mian intencon estas necesa kunlaboro kun virinoj pro tio, ke virinoj estas centprocente plifideblaj diference de viroj. Kune ni plantadas tamarindojn aŭ citronarbojn. Ĝiajn fruktojn la virinoj povos poste vendadi kaj tiel komenci malgrandan entreprenadon."

Ĝis nun dum tri jaroj ili sukcesis planti "nur" 142.000 plantidojn. Diémé kredas, ke planti kvin milionojn da arboj estas nur demando de la tempo.

El la ĉeĥa revuo Květy (Floroj), trad. E. Pazourková

## **Karaj redaktoroj de Novaĵoj tamtamas,**

unue mi volas esprimi mian dankon pro la regula sendado de via interesa gazeto kun tiel longa historio.

Nun mi reagas al por mi surpriza artikolo (preskaŭ recenzo) de Arne de la aŭtoro Leif Nordenstorm el la plumo de Sibayama Zyun'iti. Mi nur volas sciigi al vi, ke vi legis certe malnovan etforman eldonon kun nigroblankaj ilustraĵoj, kiu tamen estis tre sukcesa, eĉ al ĝi estis aljuĝita dum la UK en Florenco la premio "Infanlibro de la jaro". Momente ekzistas jam la tria eldono, pli granda, solide bindita, kun koloraj ilustraĵoj, kiel vi povas trovi ĉe <https://www.kava-pech.cz>

Danke kaj amike vin salutas via ĉeĥa amiko Petr Chrdle  
Transprenite el la Novaĵoj Tamtamas 393/februaro 2024

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,  
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: [aeh@esperanto-aeh.eu](mailto:aeh@esperanto-aeh.eu) interreto: [www.esperanto-aeh.eu](http://www.esperanto-aeh.eu)

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.